# INA

INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

**2006-04**

**Oktobro 2006**

**ISSN-1612-7927**

***ina-asocio@web.de***

***www.esp-ina.com***

*€ 3,50*

# INA-kunsido en Florenco




*Prof. D-rino Alicja Lewanderska movigas la partoprenantojn. Detalojn legu sur paĝo 6*

# La ĉakroj (4)

*Daŭrigo el n-ro 200-02*

La tria ĉakro nomiĝas la manipura aŭ sunplekta ĉakro.

Ĝi troviĝas je la nivelo de la talio, ĉe la stomako, iom sube de la brusta osto. Ĝi koncernas la ligon inter la sinmemo kaj la ĉirkaŭa mondo, formigo de la ekzisto, rilato inter pensado kaj sentado. Do mallonge: liŝia pozicio en la mondo. ĝi estas la plej konata ĉakro. Eĉ homoj, kiuj nenion scias pri ĉakroj, konas la "plexus solaris" Kiam ni rilatas la bazan ĉakron al la introverteco, tiam ni rilatigu la 3-an al la ekstroverteco.

En la 2-a ĉakro ni jam serĉis akompanon, nun estas la tempo por malfermiĝi al la cetero de la mondo. Tial la rilato al la suno. De ĉi tiu ĉakro ni volas el- kaj disradii nian kontaktemon al nia medio, nian simpation al niaj kunhomoj, nian deziron ludi rolon en tiu socio.

Kiel kernovorto ni povas konsideri ĉi tie „kontakto“. Nia suna interplektaĵo koncernas la emon sentigi sian influon, la memstarecon, liberecon, memfidon, la eblecon de gvidado, regado, aŭtoritato, organizado, kaj la naturan superecon, ĉio ĉi en plena malfermiteco kaj sincereco. Ĉe malbalanco en ĉi tiu regiono la emo sentigi sian influon, pedanteco kaj ribelado superas.

La rilato kun la cifero 3 montriĝas en la kompletiĝo de onia fizika kaj familia vivo. Post la edukado kaj baza lernado nun venas la tempo por elekti profesian studon por poste, aŭ tuj trovi funkcion, perlaboron en la socio kaj realigi ambiciojn. Ankaŭ venas la tempo por serĉi kaj trovi partneron kaj fondi familion (patro + patrino + infano = 3).

Ja ne senkaŭze la sunkunplekta ĉakro kovras la aĝperiodon de ĉ. 14 - 21 jaroj. Estas la tempo de pubereco kaj adulteco, de ekstera amuziĝo, de malkovro de la ekstera mondo (diskotekoj, drogoj, eksterlandaj ferioj ktp.) kaj ekestas la deziro pri pli da sendependeco. En diversaj landoj tio rezultas en la fakto, ke la ido forlasas la hejmon por memstare loĝi en luita ĉambro aŭ studentejo. Do, alia kernvorto por ĉi tiu ĉakro estas "memstareco".

En la manipura ĉakro oni plenumas la 3 dimensiojn de la ĉiutaga vivo.

Oni memstaras en la socio kiel postvivanto (1-a), respondeculo (2-a) kaj utila sociano (3-a). Ĝi kontrolas la persisteman energion, la streĉon kaj la emocion. La koncerna elemento de ĉi tiu ĉakro ja ne povas esti alia ol la fajro. Kaj libere rigardante la eksteran mondon la koncerna senco ja devas esti la vido, do la okuloj.

Organoj influitaj de tiu ĉi ĉakro estas la hepato, pankreaso kaj lieno. La kontakto kun la fizika mondo okazas per la anuso.

Fizike ĝi estas ligita al la regiono de la 2-a limba vertebro ĝis la 10-a brusta vertebro.

Manipuro povas esti influita per la koloro flava, kaj per muziko per libere vibrantaj lamenetoj, kiel harmoniko, akordiono (ĝi ja pendiĝas de la stomako!) harmoniumo kaj gurdo.

La tono reganta estas "mi".

# La ĉakroj (5)

Nun ni estas duonvoje. Vere: ja pasis tri ĉakroj, precipe materiaj, la 5-a ĝis la 7-a ĉakroj estas pli spiritaj. Kaj la 4-a mezvoje, estas la ligo inter la fizika kaj la mensa/spirita parto de nia ekzisto. Ĝi nomiĝas la Anahata aŭ kora ĉakro kaj situas meze inter la mampintoj. Ĝi regas la regionon inter la 9-a kaj la 3-a brustvertebroj.



*La ĉakroj*

La korĉakro prezentas la sinrealigon, unuiĝon, sindonon kaj amon. Enbalance, do malfermite, ĝi montras malfermitecon, spontaneon, harmonion, korecon kaj sinceran varmon. Elbalance, do fermite, ĝi rezultas en sindubo, problema emocia vivo, problemoj pri amikecoj kaj rilatoj, malfido, lukto inter korpo kaj menso.

En la numerologio la 3 reprezentas i.a. la 3-dimensiajn aspektojn, kiuj estas materiaj.

La 4 aldonas la spiritan dimension, do la rilato kun la korĉakro estas klara. Same la koloro: verda, do klara al Esperantistoj. Leginte la karakterizon de ĉi tiu ĉakro vi ne miros, ke ĝia elemento estas la aero kaj ĝia sento la tuŝo, do la haŭto. En amo oni ja karesas, ĉu ne?`Anahato regas la koran ritmon, timuson kaj pulmojn, kaj manifestacias sin per la generiloj.

La muzikinstrumento estas la harpo, mandolo, mandolino ktp. La reganta tono estas "fa".

La aĝperiodo (21-28 jaroj) markas la transiron de lernado al laborado, de scio al sperto, de "libero" al geedziĝo.

# La ĉakroj (6)

La 5-a ĉakro estas la Viŝuda aŭ gorĝa ĉakro. Ĝi troviĝas en la suba parto de la gorĝo kaj kovras la regionon de la du plej supraj brust- kaj ĉiuj nuk-vertebroj. Ĝi koncernas la scion, intelekton, parolon, kaj esprimadon,

kaj tiel regas la aŭdadon, aŭskultadon, lernadon, komunikadon. La aganta senso do estas la oreloj. Malferma viŝudo montriĝas per facila esprim-maniero, distingeblo, flekseblo, justeco, konscio kaj skrupulo.

Blokita gorĝĉakro evidentiĝas per la malfacila kontaktiĝo kun aliuloj, malfacila realigo de kreivo, ŝajnkonduto kaj deprimo. Tiaj personoj „englutas“ tro multe da aliuloj, kaj klopodas klarigi ĉion logike aŭ redukti je teĥnikoj. La gorĝo estas la sidloko ankaŭ de la konsterniĝo kaj timo. Konata estas la gesto (precipe ĉe virinoj) permane kapti al si la gorĝon pro subita teruriĝo. La elemento apartenante al ĉi tiu ĉakro estas la etero. Ĝi kontrolas la gorĝon, tiroidojn kaj cerbon.

La reganta koloro estas blua kaj la ŝatata muziko estu ludata per latuninstrumentoj. La reganta sono estas la tono „sol“.

Ofte oni ligas la gorĝan ĉakron ankaŭ al la intuicio, sed mi preferas ligi tion al la 6-a ĉakro.

La numero 5 reprezentas komunikadon, pensadon, verkadon kaj moviĝon. La aĝperiodo estas de ĉ. 28 - 35 jaroj.

*Artikolo de Kees Ruig, Nederlando, daŭrigota*

# Orel-akupunkturo

*D-ro Frank Herfurth, Germanio*

La orelakupunkturo aŭ aŭrikuloterapio kiel ni nuntempe aplikas ĝin estas tre juna speciala formo de la akupunkturo. Ĝis hodiaŭ oni ne jam scias detale, kiel la orelakupunkturo efikas.

Sed dume ĝi fariĝis tre solide, facile kaj relative rapide lernebla formo de la akupunkturo.


Facile kaj rapide lerneble signifas nature nur, ke ĝi bazo rapide lerneblas. Nur en la praktikado montriĝas plie la majstro.

Ekzakte kiel la korpoakupunkturo la orelakupunkturo havas tre grandan nombron da indikoj.

Principe validas la de Nogiér eldirita frazo:

***Ĉiun sur traŭmo bazitan doloron oni povas profunde, rapide kaj longtempe mildigi per la orelakupunkturo.***

Speciale pruviĝis la orelakupunkturo je la kuracado de doloroj kaj alergioj (kapdoloro, migreno, nutraĵoalergioj) kiel ankaŭ je la kuracado de malsanoj de la movosistemo.



La maldekstra orelkonko

Ankaŭ pri la manioterapio (ekz. senfumigado aŭ manĝomanio) uzatas la orelakupunkturon sukcese – almenaŭ kiel aldona terapio.

Pliaj aplikebloj estas malsanoj de la spirosistemo (ankaŭ bronka astmo) kaj de la stomako-intesto-organoj.

La punktoj de la orelakupunkturo troviĝas plejparte sur la antaŭa flanko de la orelkonko, kelkaj punktoj troviĝas sur la dorsflanko de la orelkonko (precipe por la terapio de la hipertensio). Eblas kombini orelakupunkturon sen komplikaĵoj kun multe da terapioj. Ofte la orelakupunkturo estas la plej efika.

Pro la mallonga lernodaŭro kaj la rapida aplikeblo multe da naturkuracistoj kaj medicinistoj inklinas al la orelakupunkturo.

La orelakupunkturo havas nur malmulte da absolutaj malindikoj:

*Lokajn brulumojn ĉe la orelo oni ne rajtas pinglumi*

*Cikatroj estas energiaj baraĵoj por la terapio*

*Oni ne prokrastu necesan operacion*

*Tio ĉi ankaŭ estas valida pri vivominacantaj situacioj.*

Kiel relativa malindiko validas gravedeco kaj rifuzo de la apliko de pingloj fare de malsanuloj. Tiukaze apliko tamen eblas per laserakupunkturo.

Instruadon pri orelakupunkturo ofertas la aŭtoro de tiu ĉi artikolo en Kolonjo (Köln).

La instruado normale okazas en malgrandaj grupoj kaj peras teoriajn bazojn kaj praktikan laboron.

*Dr. Frank Herfurth*
*Vorgebirgstr. 178*
*D – 50969 Köln, Germanio*

*retpoŝto: praxis@fhherfurth.de*

# INA-kunsido dum UK en Florenco

Tiuj, kiuj jam partoprenis niajn kunsidojn, scias, ke ili ĉiam estas viglaj, kun interesa kaj varia programo. Tial ni preskaŭ ĉiam povas saluti pli ol cent partoprenantojn.

Ĉifoje la afero bedaŭrinde ne tiel glate funkciis. Pro diversaj kialoj nia kunsido ne estis anoncita en la kongresa libro. Eĉ se, ĝi ne multe helpus, ĉar ĝi okazis tuj post la solena inaŭguro, kiu kiel kutime daŭris tro longe. La plej multaj nun ŝatis tagmanĝi, la aliaj ne trovis nian salonon, kiu estis - kiel la inaŭguro - en alia domo kaj ne la kongresa domo mem.

Ni mendis pro la sperto, ke ofte la sidlokoj ne sufiĉas dum niaj kunsidoj, tre grandan salonon, en kiu perdiĝis la malmultaj partoprenantoj.

De la estraro ĉeestis nur la nova prezidanto de INA, Harald Schicke, la redaktoro de tiu ĉi revueto, kiu unue dankis al la antaŭa prezidanto, D-ro Puramo Chong, pro lia sindonema laborado por INA ekde ĝia fondiĝo. D-ro Chong nun estas Honora Prezidanto de INA kaj daŭre subtenos la laboron de INA.

D-ro Ferenczy, la prezidanto de UMEA, salutis nian kunsidon certigante bonan kunlaboradon de la du asocioj en la estonteco.



*La sekretariino de UMEA, s-ino Katarikna Farago, kaj la prezidanto de UMEA, D-ro Imre Ferenczy.*


Nia programo estis interesa kiel kutime. Ĝi estis dividita en tri partoj.

Unue: Prezento de la laboro de INA dum la pasinta jaro. Tiu parto ankaŭ inkluzivis raporton pri la 4-a EMEK (poste pli da detaloj), en kiu partoprenis Harald Schicke kiel reprezentanto de INA.

Due: Prelego pri "La kuracado laŭ Pastro Kneipp" (vidu INA-revuon 2005-02).

Trie: Prelego de Prof. D-rino Alicja Lewanderska pri "Eblo de feliĉo, sukceso kaj riĉeco" (vidu la titolpaĝan foton).

Dum la kongresa semajno multaj membroj kaj interesuloj esprimis sian




*Prelego de Harald Schicke: „Kuracado laŭ Pastro Kneipp“*

fortan bedaŭron, ke ili ne sukcesis partopreni nian kunsidon. La estraro lernos el tio, pli bone kontroli la organizan parton de nia kunsido (kiam?, kie?). Tiun taskon transprenis la sekretariino de INA, s-ino Rosa Ebel.

# Pri la estraro

Kiel vi jam povis legi en la INA-revuo 2005-2, nia tiama prezidanto D-ro Chong, translokiĝis al Ĉikago, Usono, kaj tie devas tre multe labori por sukcesigi sian klinikon, plekti kontaktojn ktp. Tial li petis demisii, ĉar por li fariĝis malfacile plenumi siajn estrarajn taskojn.

Tiu decido estis tre malfacila por li, ĉar sen lia 20-jara laborado por INA, INA verŝajne ne ekzistus. Li apartenas al la kunfondintoj kaj estis komence sekretario kaj redaktoro ĝis la tiama prezidanto D-ro Carmel Mellia retiriĝis. De tiam D-ro Chong estis prezidanto de INA.

Ni multe dankas al li pro liaj multegaj meritoj je INA! Li akompanos la laboron de INA atente kiel Honora Prezidanto.

La prezidanto de INA estu naturkuracisto. En la estraro krom D-ro Chong nur la redaktoro de la INA-revuo estas naturkuracisto. Tial aŭtomate Harald Schicke elektiĝis la posteulo en la prezidanteco.

La taskon krei kaj flegi la retpaĝaron de INA transprenis vicprezidanto Wang Xigeng.

# El INA-laboro

## *El Ĉinio*

Tre diligente laboras nia ĉina peranto, D-ro Wang Disheng, kies libron "Tradicia Ĉina Dieto" ni jam prezentis al vi en la INA-revuo 2006-1. Li sendis al ni jenan raporton:

La Esperanta Komerca kaj Kultura Seminario de Wuyishan (en Fujian provinco) estis okazigata de la Esperanta Komerca Asocio de Fujian provinco, dum 4-a - 7-a de julio. Ĉirkaŭ pli ol sep dek esperantistoj aŭ ŝatantoj de Esperanto ĉeestis al la seminario, kiuj troviĝas el la diversaj provincoj de Ĉinio kaj el Aŭstrilo, Turkio, Belgio kaj inter kiuj  prezentiĝas la estroj de Ĉina Esperanta Asocio kaj redakcio de Popola Ĉinio.

La seminarion aŭspiciis la Komerca Asocio de Fujian  kaj la sukcesaj komercistoj en Wuyishan urbo. La direktoroj de la asocio kaj komercaj organizoj honore ĉeestis al la seminario. Krome la reprezentantoj de kelkaj Esperantaj organizoj de Ĉinio kaj de internacio honore ĉeestis al ĝi.

Mi kiel unu membro de la inaŭgura podio, faris la gratulan paroladon je la nomo de Ĉina sekcio de INA al la kongreso, kio faris la multajn ĉeestantojn koni INA-on.

En la fak-kunsidoj mi prezidis la seminarion de kultura sekcio kaj  mi konigis kaj montris la revuon de INA al la ĉeestantoj.




Mi detale sciigis al ĉeestantojn la informon pri ĝia organizo, movado, trajto ktp. Ili havas unu freŝan kaj bonan koncepton pri INA.

Ankaŭ en la kunsido, mi disdonis la aliĝilon al ĉeestantoj kaj esperas tiuj kiuj interesiĝas en INA aliĝos al ĝi.

Krome la aliaj reprezantantoj el la diversaj Esperantaj organizoj aktive kaj interese parolis, diskutante pri la Esperanta aplikado en diversaj kampoj de kulturo kiel medicino, instruado ktp. La ĉeestantoj akiris pluan kompreniĝon kaj novan koncepton pri E-a aplikado en fakultato.

Post la kongreso, la ĉeestantoj grupe vojaĝ-ĝuis la belegan pejzaĝon de Wuyishan Monto, kiu impresis nin freŝe kaj  mirinde.

## *El Tanzanio*

El Tanzanio skribis Mutetulwa Muhasa Wa Mahungu. Li estas fakdeligito de UEA pri naturkuracado kaj membro de INA.

En sia letero li skribas i. a.: „Ni estas en kampadejo en Tanzanio...

Ni treege ĝojas prezenti al via instanco tiun ĉi embrian manuskripton kiel unu el la rezultoj de nia konsidero pri nia medicino...

Vi rimarkos ke tuta nia komunikaĵo bezonas fotojn por permesi vian klaran kun la plantoj nialingve nomitaj... Sed al ni mankas propra fotilo...

Estas vere ke tiu ĉi naturmetodan kuracon ni heredis de niaj gepatroj tio estas kaŭzo por pluraj inter ni kaj daŭrigas ĝin same kiel ili..."




*Dum kunsido en marto 2006*



*Dum kunsido en aprilo 2006: Kun ruĝa ĉapo:  Mutetulwa Muhasa Wa Mahungu*

S-ro Mutetulwa Muhasa Wa Mahungu kaj la aliaj sur la fotoj fondis la asocion Arbo por la Sano (Sanaro), kiu volas konservi la scion pri naturkuradado en sia lando kaj interŝanĝi tiujn informojn kun INA. Ĝuste tio estas la laŭstatuta laboro de INA.



. ARBO POR LA SANO FIZI
SANARFI

UNUA NUMERO
julio 2006

. LA KONSERVADO.

la verba radikovorto = Konservado estas sinonima al la vorto, gardi; ambaŭ signifas, neperdi. La perdiĝo, do faktas ke io kvankam ekzistas, ĝi estas je loko kaj malklaras ideon pri ĝia lokiĝo, eble la antaŭa uzanto aŭ posedanto ne kapablas utiligi ĝin pro pluraj motivoj.

Eble la perdo okazis sen intence, ĉar imperativaj postuladoj tempa kaj cirkonstanca ligitaj, tion diktis.

La konservado do, fariĝas la la malo al tio, sence ke postu-

*La unua numero de Arbo por la Sano*

S-ro Mutetulwa Muhasa Wa Mahungu kunsendis la unuan eldonon (julio 2006) de la informilo de Arbo por la Sano. Pro manko de aliaj rimedoj ĝi estas mane skribita. El la enhavo:

- La konservado
- Resanigo
- La veneno
- Ĉu novaĵoj ekzistas?
- Nia apoteko estas kun ni

Ĉar al ili mankas ĉio, estus bona ideo, sendi faklibrojn, revuojn, fotilon kun filmoj. INA pensos kiel subteni Arbo por la Sano.

Jen la adreso:

Arbo por la Sano
B. P. 34 Uvinza
Kiuoma/Tanzania
Rete: Sanar@cashette.com

# 4-a EMEK




En tiu ĉi jaro la kunlaboro inter UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) kaj INA konkretiĝis. Dum la 4-a Eŭropa Medicina Esperanto-Kongreso (EMEK) de la 22a ĝis 26a de julio en Hódmezővásárhely, Hungario, partoprenis Harald Schicke kaj faris du prelegojn kun la temoj:

- Sanigaj efikoj de biero
- Baŭnŝajtismo - vojo al la sano

Pri la lasta temo vi povas legi en „Naturkuracado 2000“, eldonita de INA.

La aranĝo, kiun partoprenis proksimume 60 Personoj, estis tre bone aranĝita de s-ino Katarina Farago. Multaj homoj helpis por prizorgi la partoprenantojn je maten- kaj vespermanĝoj.

En la varia programo elstaris la oficiala akcepto en la urbestra salono, la kongresa balo, la prelegaro en lundo, praktikado de Yumeiho en la kuracejo de s-ino Farago kaj la tutaga ekskurso.


Post la oficiala fermo de EMEK grupo de partoprenantoj postkongrese vizitis Budapeŝton kaj de tie daŭrigis al UK en Florenco.



*Dum la solena inaŭguro en la salonego de la urba deputitaro en la urbodomo*



*Dum la urbestra akcepto*




*Dum la prelego pri la saniga efiko de biero en la teknike bonege ekipita salono*

Sendube 4-a EMEK estis tre sukcesa. En 2008 okazos la centjariĝo de UMEA. Tiam okazos IMEK (Internacia Medicina Konferenco en Krakovo, Pollando.

**INA** estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio

Eldonejo: MZ-Verlag Ltd.
Schoolbrink 12, 27383 Scheessel, Germanio. Rete: info@mz-verlag.de
www.mz-verlag.de

Ĉefredaktoro: Harald Schicke

**Adreso de INA:**
Harald Schicke
Schoolbrink 12, 27383 Scheessel
Germanio
Tel: +49 4263 94087
Fax: +49 4263 94088
schicke@mz-verlag.de

**Adreso por korespondado:**
Rosa Ebel, Schmiedestr. 99
47809 Krefeld, Germanio

**Retadresoj:**

ina-asocio@web.de
www.esp-ina.com

# Libro pri biero

.La delonge elĉerpita libro "Germanaj biero kaj bierkulturo" de Harald Schicke baldaŭ reaperos en la tria eldono. Ĉifoje la libro estos lukse bindita kaj komplete kolore presita.

Kompreneble en ĝi ne mankas multaj informoj pri la saniga efiko de biero, sed ĝi ankaŭ informas pri la ingrediencoj de bona biero kaj la tekniko de la bierfarado.

Ĝi estas unika faklibro pri biero en Esperantujo kaj certe ne manku en la libroŝranko eĉ de homoj, kiuj ne trinkas bieron. La nuna eldono estas aktualigita kaj aldoniĝis diversaj interesaj informoj.




La libro ampleksas 119 paĝojn, estas fortike bindita, komplete kolore presita. ISBN 3-89240-124-1 kaj kostas nur € 12,00.

Mendu ĝin ĉe la libroservoj aŭ rekte ĉe la eldonejo: MZ-Verlag Ltd., Schoolbrink 12, 27383 Scheessel, Germanio. Rete: info@mz-verlag.de Aldoniĝas sendokosto.